



**PILO-PRESS**

Internacia

Informservo

Pilo-Press

Jara abono

30,- GM

**Eldonanto/Herausgeber:**

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 34/77 - 31 aŭg 1977  
Aperas ĉiusemajne

### Grava iniciato: Eŭropa Kalendaro

Paderborn (pp) - Europa Klubo Paderborn ĵus eldonis "Eŭropan Kalendaron" por la lastaj kvar monatoj de 1977. Ne estas kutima kalendaro, ĝi estas kalendaro "ludiga kaj lerniga (ne nur) por infanoj".

La kalendaro prezentas ilustrite - en la sep lingvoj de la naŭ landoj de Eŭropa Komunumaro kaj en latina lingvo tradukite - por ĉiu tago novan vorton aŭ plurvortan esprimon de la Internacia Lingvo (Esperanto) kaj por la semajnfino frazeton enkondukantan gramatikeron. La eroj de la folioj estas distranĉeblaj kaj tiel taŭgas kiel lerniga puzzle - do amuza kaj efika donaco (ne nur) al infanoj.

La motivoj por la eldonado de la plurlingva kalendaro estas:

"La Eŭropa Unio estas kaj restas plurlingva. Necesas lerni fremdajn lingvojn" kaj

"Nur unu vojo kondukas al eŭropa unuiĝo, tamen ebligante samrajtecon de la eŭropaj popoloj kaj defendon de iliaj kulturoj: komuna, neŭtrala dualingvo. La Internacia Lingvo kaj la Lingua Latina estas je dispono."

La redaktorajn taskojn plenumis s-ino Brigitte Frank-Böhringer, kiu ankaŭ faris la desegnaĵojn.

La prezo por la kalendaro sep-dec. 1977 estas 4,90 + -,70 GM por afranko. Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg1, Postĉekkonto Nürnberg 819 56-851.

Eŭropa Kalendaro aperos ankaŭ por 1978! Antaŭmendoj jam eblas.

### La Faraono en kasedoj

Varsovio (pp) - Unu el la ĉefverkoj de la pola klasika literaturo kaj samtempe unu el la ĉeftradukoj de la Esperanto-literaturo, La Faraono de Bolesław Prus, aperos en la fino de septembro en kasedoj. La tuta verko estas jam surbendigita kaj ĝi konsistas el 38 unuhoraj kasedoj.

La iniciaton surbendigi ĉi tiun verkon entreprenis Pola Asocio de Nevidantoj. La laboro komenciĝis en la fino de la pasintjara novembro kaj ĝi daŭris ĝis la fino de aprilo nunjare. La verko laŭtlegas Andrzej Pettyn, kies voĉon oni elektis por la surbendigo en interkonsento kun polaj kaj alilandaj esperantistaj nevidantoj.

Diverslandaj nevidantoj povas jam nun venigi por si la kompletan de 38 kasedojn pere de la landaj blindul-organizaĵoj, respektive pere de blindul-bibliotekoj, prunteprenante ĝin senpage aŭ interŝange je aliaj registritaj sonbende libroj (ne nepre esperantlingvaj). Ĉiuj ceteraj esperantistoj aŭ esperantistaj kluboj kaj organizaĵoj povas aĉeti la kompletan. La prezo ankoraŭ ne estas fiksita, sed interesiĝantoj povas rekte sin turni al: Pola Asocio de Nevidantoj - PZN, Biblioteka Nie-widomych, ul. Konwiktorska 9, PL-00-216 Warszawa, Pollando. Oni skribu esperantlingve, brajle aŭ per ordinara skribmaŝino.

Valoras aldoni, ke aŭtune Pola Asocio de Nevidantoj komencos la surbendigon de la fama verko de Henryk Sienkiewicz "Quo Vadis" en la traduko de Lidia Zamenhof. Ankaŭ ĉi tiun romanon laŭtlegas Andrzej Pettyn.

Jerzy Tambor

## Eŭropa Kongreso 1979 en Saarbrücken

Saarbrücken (pp) - La preparoj por la Eŭropa Esperanto-Kongreso 1979 sub gvido de Sarlanda Esperanto-Ligo bone progresas. Kvar landaj Esperanto-asocioj, nome Belga Esperanto-Federacio, Germana Esperanto-Asocio, Luksemburgia Esperanto-Asocio kaj Unuiĝo Franca por Esperanto deklaris sin preta partopreni en la komuna kongreso en Saarbrücken.

La ĉefurbestro de Saarbrücken, Oskar Lafontaine, jam dediĉis al la kongreso saluton, kiu tekstas:

"La landa ĉefurbo Saarbrücken estas loko de la Eŭropa Esperanto-Kongreso en 1979.

La landaj asocioj de Belgujo, Francujo, Luksemburgo kaj Federacia Respubliko Germanujo komisiis al Sarlanda Esperanto-Ligo la organizon kaj aranĝon.

Mi ĝojas, ke oni elektis por ĉi grava kongreso la sarlandan metropolon kaj pro tio dankas la koncernajn gremiojn.

La situo de Saarbrücken kore de Eŭropo ĉe la germana-franca limo aparte taŭgigas la urbon por ĉi kongreso.

Mi tre kore bonvenigas en Saarbrücken ĉiujn kongresanojn kaj gastojn de ĉi internacia kongreso kaj estas konvinkita, ke, apud la disvolvigo de la kongresa programo, restos tempo kaj okazo por konatiĝi proprasparte kun la belajoj de nia urbo."

Pro proponoj kaj informoj pri la kongreso oni sin turnu al Sarlanda Esperanto-Ligo, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler.

### Aŭtunaj Esperanto-aranĝoj

Konferenco de Nordgermana Esperanto-Ligo, 24-a kaj 25-a de septembro 77 en la klubejo de Hamburga Esperanto-Societo, Hamburg-Langenhof, Vehrenkampstr. 15-17.

La konferenco komenciĝas sabate, la 24.9.77 je la 11-a horo. Informojn donas: Hella Lanka, César Klein-Ring 14, 2000 Hamburg 60, Tel. 6313838.

10-a Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo, 30-a de sept. ĝis la 2-a de oktobro en konferencejo "Junkerwald" de "Arbeitskammer des Saarlandes" en Blieskastel-Niederwürzbach. Informojn donas: Sarlanda Esperanto-Ligo, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler.

Aŭtuna Kunveno de Bavara Esperanto-Ligo en Lichtenfels, gastejo "Wallachei", Wallachei 1, 30-a de sept. kaj 1-a de okt. 1977. Programo havebla ĉe Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1. Loka organizanto: Hans Müller, Zweigstr. 2, D-8620 Lichtenfels.

SOGELO-Tago 1977 en Hohrith (Nigra Arbaro), 8-a kaj 9-a de oktobro 1977. Informojn donas: Esperanto-Grupo Oberkirch, Lohmühlweg 1, D-7602 Oberkirch.

Trilanda Renkontiĝo Bazelo, 15-a kaj 16-a de oktobro 1977, restoracio Rialto Viaduktstr. 60, Basel, Svislando. Informojn donas: Esperanto-Grupo Basel, E. Döring, Spalenvorstadt 7, CH-4051 Basel, Svislando.

Trilanda Renkontiĝo en Heerlen (Nederlando), 16-a de oktobro 1977, Restoracio "La coq d'Or", Emmastr. 1, Heerlen. Informojn donas: S-ro H. Peters, Nobelstr. 57, Heerlen, Nederlando, Tel. 045-715449

\*\*\*\*\*

Vivo de Zamenhof de Edmond Privat denove estas havebla! Jus aperis la 5-a eldono de The Esperanto-Publishing Company, Orelia, Aŭstralio. En solida bindaĵo ĝi prezentas legindan biografion de Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, verkita de kompetenta esperantisto, kiu havis multajn personajn kontaktojn kaj rilatojn kun Zamenhof. Prezo 13,60 DM  
Mendonumero: 9200.2. Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg.

Internaciaj ferioj de Asocio de germana katolika juneco

Kristnask-feriosemajno 26-a de dec. 77 - 1-a de jan. 1978

Martaj feriosemajnoj 4-a marto - 11-a de marto 1978 kaj

11-a marto - 18-a de marto 1978

La internaciaj ferioj okazas en la domo "Seen" en Serneus apud Davos, Svislando.

Prezoj por plenkreskuloj ekde 18jaroj: 140,- GM

Geedzoj kune : 250,- GM

Junuloj ĝis 17 jaroj: 125,- GM

En la feriosemajnoj povas ankaŭ partopreni neesperantistoj, por kiuj eblas informoj pri kaj ekzercoj en Esperanto.

Informojn donas: Pfarramt (paroĥejo) Unterkirnach, Kirchplatz 4, D-7731 Unterkirnach, F R Germanujo, tel. 07721/54717.

\*\*\*\*\*

Impona IKUE-kongreso

Ĉenstoĥova (pp) - Laŭ diversaj raportoj, kiujn ricevis Pilo-Press, la 37-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista estis impona aranĝo, kiu okazis en la pola kultloko katolika Ĉenstoĥova en ĉeesto de 707 kongresanoj el 22 landoj.

La inaŭguran meson en Esperanto celebris 7 episkopoj kaj 50 pastroj el diversaj landoj. Papo Paŭlo VI sendis saluttelegramon. Pri la kongreso nia leganto kaj korespondanto D-ro J. Kondor el Neuwied sendis tre interesan ampleksan raporton, el kiu ni citos en la venonta numero de PP.

La kongreso trovis atenton ankaŭ en la pola publiko. La Esperanto-redakcio de Pola Radio kelkfoje raportis pri la kongreso kaj ankoraŭ kelkfoje revenos al ĝi ( en Esperanto-Ekspreso). La varsovia gazeto "Zycie Warszawie" publikigis pri la kongreso intervjuon - frontpaĝe - kun pastro D-ro Biedulski, prezidanto de IKUE, en kiu li speciale elstarigis la gravecon, ke tiu kongreso unufoje okazis en Pollando.

La venonta IKUE-kongreso okazos post du jaroj en Luksemburgo.

Tre entuziasme pri la kongreso parolis karavananoj de italaj esperantistoj el Triento kaj aliaj lokoj, kiu reveture al Italio tranoktis en Nürnberg.

Esperanto en la Germana Televido

Reagoj al la elsendo de 22.8.77 (Vidu PP 33/77 p. 4)

Pri la elsendo skribis nia leganto Reinhard Rabusch, Bad Oldesloe: Vidinte la elsendon mi opinis partopreni la entombigon de Esperanto...

14-a gimnaziáno A.P el Neustadt kritikas la fuŝproncon de la vorto "internacia" per "internatŝia". Laŭ li televida raportisto devas informi pri prononco de Esperanto-vorto.

Rudolf-Josef Fischer, 4401 Nordwalde skribas: "Responde al via demando rilate la eŝon en la publiko al la televid-elsendo "Drehscheibe" de la 22-a de aŭgusto, mi povas rakonti al vi, ke mi interparolis kun 18-jara knabino, kiu diris, ke ŝi ricevis la impreson, ke esperantistoj estas stultuloj, kiuj volas ĝui iun Esperanto-kulturon per rigardado de teatraĵoj, kiuj antaŭe estas tradukitaj en Esperanton. Ŝi opiniis, ke la komentario estis sufiĉe negativa kaj moka pri Esperanto.

Mi ankaŭ devas diri, ke mi estis malĝojige tuŝita de la elsendo, ĉar la bona volo de la agantaj esperantistoj estis inversigata kontraŭ Esperanto de la antaŭjuĝanta redaktoro. Almenaŭ la intervjuo kun Elsbeth Bormann povis fari bonan impreson, malgraŭ la nura prezentita informo,

(daŭrigo sur p. 4)

## Esperanto en la Germana Televido (daŭrigo)

ke Esperanto estas subtenata en orient-Eŭropo povus ankaŭ doni la ideon pri komunista afero.

Ĝenerale mi devas diri, ke la publiko ne komprenas la ideon de Esperanto kiel "kulturlingvo" kaj ke argumentoj pri aliaj utiligeblecoj pli taŭgas. Plej bone, oni rezignu pri televida elsendo, se oni ne antaŭe povas garanti neutralan kaj ĝustan informadon."

## Esperanto en Radio

D-ro J. Kondor, Neuwied, vizitis la Esperanto-redakcion de Pola Radio. Jen liaj impresoj: "Sed ĉio estas bona, se la fino estas bona: ni sukcesis kontaktiĝi kun Pola Radio telefone kaj post kelkaj minutoj jam venis nia kara, ĉarma Barbara Pietrzak por gvidi nin al la radiopalaco. Tie ni konatiĝis ankaŭ persone kun karaj s-anoj Jan Klimek, A. Pettyn, J. Grum, kies nomojn mi jam parkere scias; ja mi estas aŭskultanto de Pola Radio ekde la naskiĝo, nome aprilo 1959! Post agrabla tagmanĝo en la restoracio de la studio mi atendis iom en la laborĉambro de s-ro J. Klimek, kaj ĝis li preparis tekston por iu sekva elsendo, mi povis konvinkiĝi pri la zorgema kolekto de miaj korespondataĵoj ekde la komencaj jaroj ĝis la nuna tempo. Ĉ. la 15,20 horo nin gvidas s-ino B. Pietrzak en subteran studion, kie ni povis vidi kaj aŭdi la surbendigon de programo de la plej proksima elsendo (kun la voĉoj de Barbara Pietrzak kaj Jerzy Grum). Poste ni atendas la alvenon de fratino Elisabeth, kiun ni ankoraŭ ekkonis en Engers, kiam ŝi vizitis nian apotekon kaj loĝanta nun en Varsovio, en monaĥinejo. Ĉar ŝi volis prezenti al mia edzino sian loĝlokon, ili ambaŭ forveturis, kaj ni, s-ino B. Pietrzak, J. Grum kaj J. Klimek veturis al popolkostuma restoracio (laŭ motivoj de Opole ornamita restoracio) kaj pasigis kelkan tempon en agrabla, amika atmosfero. La speciala pola ŝinko precipe bongustis al mi, al kiu mi povis trinki bonegan hungaran ruĝan vinon: Egri bikavér (Taŭrosango de Eger!). Ĉ. la 18-a, kiam jam ankaŭ mia edzino revenis kun fratino Elisabeth, ni volas adiaŭi en la antaŭhalo de la studio, kiam ĵus venis s-ro Jerzy Uspienski kaj ni ĝoje interkonatiĝis.

Ankaŭ la reveturo - sub la stirado de mia edzino - daŭris precize du horojn. Estis belega tago, neforgesebla, ĉar mi fine sukcesis eĉ persone konatiĝi kun miaj karaj, amataj gesamideanoj ĉe la Pola Radio!"

Varsovio elsendis tri interesajn intervjuojn kun la LKK-prezidanto de Rejkjaviko Ragnarsson, William Auld kaj pastro Kindler-Triksini.

Zagrebo. La vojaĝo de prezidento Tito en Soveta Unio, Norda Koreujo kaj Ĉinio estis temo de la "Informoj el Jugoslavio". Tre interesaj estis denove la koncizaj recenzoj de ricevitaj periodaĵoj.

Romo raportis pri la UK en Rejkjaviko laŭ la raportoj de la kongresa gazetara servo. Sufiĉe bone aŭskultebla!

Vatikana Radio: Informoj el la eklezia vivo kaj raporto pri la IKUE-kongreso en telegrama stilo laŭ telefonaĵo el Varsovio de pastro Biedulski.

Svisa Radio Kurtonda. D-ro Arthur Baur prelegis - laŭ instigo de Lucien Giloteaux - pri la svisa poŝtaj aŭtobuslinioj. Claude kaj Andrée Gacond parolis pri nove aperinta interesa libro en franca lingvo de Pierre Hirsch pri la korespondataĵoj inter Edmond Privat kaj Romain Rolland.

ORF Vieno. La semajna komentario, ĉi-foje denove de d-ro Alfred Macher, tuŝis la veteron, la turismon kaj la nuklear-centrejojn. "Kial, cetero, la fakuloj ne provas utiligi la superabundajn vulkan-energiojn? Ĉu ni ne gajnus, tiamaniere, kaj la necesan elektron kaj ree laŭordan veteron?" La letepkresto mencias, kiel ĉiam, la plej novan numeron de Pilo-Press kaj s-ino Erika Lins prezentis raporton pri la ILEI-kongreso en Luksemburgo, legita de Ingrid Plazotta kaj Emil Vokal.

Pekino estis bone aŭdebla ĉi tie en Nürnberg.